6-a JARO, N-o 310



LEIPZIG, 11. / 9. 1930

ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA
KULTURA KAJ INTERHELPA ORGANIZO DE PROLET-ESPERANTISTOJ

APERAS SEMAJNE	REDAKTEJO: 14, avenue de Corbéra, Paris 12e. – GVIDANTO: E. Lanti. – SIDEJO DE PLENUM-KOMITATO DE SAT: 23, rue Boyer, Paris 20e. – ADMINISTREJO: R. Lerĥner, Kolmstrasse 1, Leipzig O 27 (Germanio).	APERAS SEMAJNE

LASTHORE!

Kiel la Centra Komitato de Sovetrespublikara Esperantista Unio klopodas por ke SAT "evitu la rifon"

Necesas hodiaŭ paroli klare k malkaŝe. Ni jam diris, ke la reteno de nia mono en Moskvo kredeble rezultas el tio, ke la koncerna tiea Instanco ne estas ĝuste informita pri nia Asocio. Ni suspektis, ke la ĝenerala sekretario de SEU ne estas fremda al tiu misinformiĝo. Ni ja povis dum multaj jaroj kolekti sufiĉe da faktoj, fari sufiĉe da rimarkoj por konvinkiĝi, ke E. Drezen per plej diversaj rimedoj ĉiam subfosadis la bazon de nia organizo. Se li ne sukcesis en siaj malindaj klopodoj, estas pro tio, ke ĝis nun li ĉiam renkontis en la komunistaj rondoj mem sufiĉan kontraŭstaron. Sed lastatempe li povis bonuzi favoran okazon por pliintensigi sian intrigadon. Kiel konate, la Soveta Registaro, streĉante la fortojn por efektivigi la grandiozan "kvinjaran planon", donis instrukciojn al la koncernaj instancoj, por ke ili severe esploru, ĉu tiu aŭ alia entrepreno havu la rajton sendi monon eksterlanden. Tio estas tute natura k aprobinda. Nu, jen oportuna okazo, kiun delonge atendis embuske la ĝen. sekretario de SEU por insidi al SAT! La plano estis ruze k malvarmsange efektivigata: unue, subfosi la financan bazon de la Asocio per reteno de ĝia mono; due, kredigi al la membroj, ke la Direkcio de SAT estas respondeca pri tia stato, tial ke ĝi "revizias", tial ke *Sennaciulo* fariĝis "kontraŭsoveta" organo — ktp., k. s. Vasta agitado estis tiucele organizita. Naivaj aŭ fanatikaj kompartianoj estis utiligataj por tia agitado; diversspecaj postendezirantoj k malkontentuloj ankaŭ helpis.

La akuzo, ke ni fariĝis "malamikoj de Sovetio", estas ne nur monstra, sed eĉ ridinda. Ne sufiĉas ja kiel pruvo la fakto, ke ni ĉiam kontraŭis al la malicaj intrigoj, kiuj celis detrui SAT! Ni opinias male, ke per tio ni pli bone defendis, defendas k defendos Sovetion ol la nuna ĝenerala sekretario de SEU. Tute ne sufiĉas loĝi en Moskvo por esti plej lojala Sovetiano. En la 301-a n-o de "S-ulo" ni parolis pri "rusto ĉe la Soveta ŝtataparato". Tia konstato ne estas ataki, sed male defendi Sovetion. La fakto, ke intrigulo k ŝajnkomunisto povas okupi respondecan postenon en SEU k misinformi ŝtatajn instancojn, estas ja signo de rusto. Kontraŭ tion cetere batalas la Sovetia Kompartio mem. Kaj estas antaŭvidebla la tago, kiam Drezen estos definitive forpelata el la Partio. Jam en la jaro 1924 li estis eksigata k povis poste esti reakceptata nur dank' al komplezo de unu aŭ du influhavaj personoj. Lastan jaron Drezen sidis ĉe la rando de eksiĝo k ricevis "admonon kun averto". Ĉu do por doni pruvon pri pura komunisteco li misinformis la Popolkomisarion por financoj pri SAT? Ĉu por kaŝi sian burĝecon, sian esperantistan neŭtralismon, k aspekti ortodoksa, li bezonis akuzi nin pri "reviziemo"? Se necesos, ni parolos aliam ankoraŭ pli precize. Ni ja ne timas ĉi tie liajn denuncojn, kiuj havis por kelkaj SAT-anoj en Sovetio malagrablajn sekvojn. Ni ne esploros nun, kial en Sovetio mem oni ne kontraŭstaras pli vigle al la agado de freneze ambicia ulo. Tion ni eble faros pli poste, se necesas . . .

Ni bedaŭras esti devigataj elpaŝi kun tiaj personecaj konsideroj; sed ni opinias necese tion fari nun por ebligi ĝustan komprenon pri la situacio en nia movado al la K-doj, kiuj povas k deziras kompreni. Tia enkonduko ja estas necesa por ke ĉiu leganto taksu ĝuste la ĉi-suban dokumenton, kiu venis en niajn manojn per vojo, kiun kompreneble ni ne konigos. Pri tio ni diru nur, ke nia informanto estas SAT-ano k ke pri la aŭtentiko de l' dokumento ne povas esti dubo.

ELTIRAĴO EL PROTOKOLO N-o 20

de Centra Komitato de Sovetrespublikara Esperantista Unio — je la 7-a de aŭg. 1930

Ĉeestis: membroj de Sekretariaro: Breslaŭ, Varankin, Demidjuk, Drezen, Incertov, Nekrasov, Usmanov; membroj de CK de SEU: Ĵavoronkov, Rublov; membro de Kontrolkomisiono de SEU — Ponjatovskij; membro de Moskva Komitato de SEU — Jakovlev k reprezentantoj de Germana Laborista Esperanto-Asocio — Bässler k Richter.

Aŭskultis:

Pri la stato en SAT k pri la lastaj elpaŝoj de SAT-Direkcio en Sennaciulo.

Estas ricevita telegramo el London: "Londona Kongreso eldiris la deziron, ke la 11-a kongreso okazu en Moskvo. Kontrolkomisiono formiĝas en Brussel. Por Lanti — 119 voĉoj; kontraŭ li — 59."

Decidis:

a) Konstati, ke propagandItaj ideoj de sennaciismo k la ĝenerala sinteno de SAT-Direkcio dum la lasta tempo nur malhelpis la SEU-laboron (elpaŝo de K-do Skrypnik). Ĉi sennaciisman ideologion necesas plej decide kontraŭbatali.

— — — — — — — — — — — —

e) Proponi al GLEA k al la ceteraj eksterlandaj LEA-oj organizadon de Akcia Societo por eldoni revoluciajn

esperantajn gazetojn k librojn. Preni sur sin la promesdevigon pri la tutpova subteno de ĉi eldona entrepreno.

f) **Jam nun,** *ne atendante la konformiĝon de la eldonejo, opinii bezona la organizadon ĉe GLEA de speciala aparato, sufiĉe reklamata, por disvastigi en la eksterlandoj la eldonojn k gazetojn de SEU.*

g) Tutforte peni, ke en la 1931-a en Moskvo okazu Internacia Kongreso de revoluciaj esperantistoj por formi la **novan revolucian organizon.**

ĝ) Pro ĉesigo importi la SAT-eldonojn en USSR-n CK de SEU estas devigita ne plenumi la punkton de Göteborg-kongresa rezolucio pri la eldono de esperanta literaturo.

h) Opinii bezonata, ke ĉiuj SEU-anoj[1]*, estantaj SAT-anoj, akurate plenumu siajn devojn en SAT k per tio evitigu la kalumniojn kontraŭ sovetiaj k komunistaj esperantistoj.*

ĥ) Laŭ la deziro de l' reprezentantoj de GLEA pri la eldonado de l' nova gazeto anstataŭ Sennaciulo unuatempe obteni la instalon en Moskvo. Redaktado efektiviĝu ankaŭ el la eksterlando. Proponi K-don Batta, kiel redaktoron.

*

Ĉu ni aldonu komentojn? Ne necesas. Kaj nun la demando estas: Ĉu la SEU-anoj, ĉu la GLEA-anoj permesos la efektivigon de tiu vera krimo kontraŭ la laboristan esperantan movadon? Ĉu do ili toleros, ke plenmano da nerajtigitoj rompu la Konvencion de Göteborg k disigu, malfortigu niajn fortojn?...

Kia ajn estos la respondo al nia ĉi supra demando, ni restas optimistaj pri la estonto de SAT. Nia organizo estas bazita sur ĝustaj principoj k ĝia fundamento estas jam sufiĉe larĝa k fortika, por ke la kunfluo el intrigo, ambicio, partia fanatiko k malsaĝo ne kapablu ĝin detrui. Neniu malkuraĝiĝu; male ĉiu konscia SAT-ano streĉu la fortojn, por ke nia organizo sen tro grava domaĝo eliru el tiu ĉi ŝtormo k ankaŭ ĉi-foje evitu mortigan rifon. Antaŭen!...

La Direkcio de SAT

J. Aber (55), L. Banmer (11), L. Glodo (50)
H. Kaŝon (24), E. Lanti (1), M. Desua (7767)

NOTOJ EL USONO

SAT-ano 488

Minacas la laboristan sindikaton en Usono la tielnomata "flava hundaĉo", t. e. kontrakto subskribita de ĉiu dungito, ke li ne aniĝos al sindikato. En kelkaj urboj, eĉ la instruistoj ne havas la rajton organiziĝi. Ekz. en Sitl *(Seattle)*, en ŝtato de Vaŝingtono, la kapitalestroj elspezis multe da mono por kapti la administradon de la lernejoj. Ili timis, ke anoj de la Amerika Federacio de Instruistoj parolus al la infanoj pri la avantaĝo de l' sindikatismo. Jen la "lando de la liberulo k bravulo".

*

La Kongreso de la Amerika Federacio de Instruistoj okazis en Memfis *(Memphis)* je fino de junio. S-ino F. C. Hens'n *(Hanson)* avertis la anojn kontraŭ atako tra la tuta lando de la kapitalistaj korporacioj. Ili volas fortranĉi la elspezojn k tute regi la lernejon. Jam ili penis fari tion en la urboj Ĉikago, Atlanta, Sajrekjuz *(Syracuse)* ktp. "Neniam dum la lastaj 40 jaroj la estonto estas tiom minacanta por publika edukado" ŝi diris en publika parolado varbante por la sindikato.

La fama filozofo k edukisto d-o John Djŭe *(Dewey)* nun ĉesas instrui ĉe Kolumbia Universitato ĉi-jare. Li ĉiam publike subtenis la A. F. de Instruistoj k admire skribis pri la soveta edukad-sistemo, kvankam li ne estas marksisto.

Brokŭud *(Brookwood)*-Labor-Kolegio jus elsendis je la servo de la laboristaro 36 studentojn, kiuj plenumis 1—2-jaran kurson de studado en la sociaj sciencoj. Tiu ĉi grupo (la oka en la vivo de Brokŭud, kiu komencis funkcii en j. 1921) venas el 14 diversaj ŝtatoj k el 16 industrioj. La Amerika Federacio de Laboro antaŭ du jaroj kondamnis la kolegion, ĉar ĝi kritike traktis la taktikon de la A. F. L. La ĉarpentista sindikato eĉ eksigis unu el siaj anoj, ĉar li rifuzis forlasi la kolegion. Sed progresuloj ankoraŭ subtenas ĝin.

*

Kiu pli gravas en lernolibro de historio? Ĉu ĝia naciismo, ĉu ĝia korekto? Ŝajne en Novjorko, laŭ la aganta superintendanto, H. G. Kembl *(Campbell)*, "la novjorkaj lernejoj interesiĝas pri historia korekto, sed pli multe pri usonigo *(amerikanisation)*". Pro tio li malpermesas la uzadon de "Moderna Historio", verkita de G. J. H. Hez *(Hayes)* k Mun *(Moon)*. Plej multe ofendis la citaĵo; "Kiam unu viro envenas la mondon senmona, dum alia heredas milionon de dolaroj, reala egalo de ŝanco ne ekzistas". Laŭ Kembl, tiu ĉi memevidenta fakto estas senkaŝa rekomendo de socialista doktrino. Ĝi kompreneble neas la fetiĉon de Usono, k en tiu lando kompleta egalo de ŝanco floras senlime. La loka estro de la Am. Fed. de Instruistoj, H. J. Linvil *(Linville)*, postulas, ke la direktoraro esprimu bedaŭron k permesu publikan ekzamenon de la verko antaŭ ol forpeli ĝin el la lernejo. Linvil diras, ke la verko estas "bone organizita produkto de la plej bona erudicio, liberala k inteligenta". Sed la Superintendanto anoncis, ke li anstataŭas ĝin per nova historio, kiu emfazas la usonan ekspansion al la okcidenta marbordo k la ĵusaj veturoj de Bed *(Byrd)* al la suda poluso. Mi pluon raportos pri la afero poste.

En Usono estas 15—20 milionoj da homoj, kiuj ne povas legi aŭ skribi. Sed antaŭ ĵus okazinta popolnombrado, estis multaj penoj ŝanĝi tiun malbonan staton. La estrino de la Am. Fed. de Instruistoj k aliaj kritikis, ĉar por plibonigi la statistikon la ekzameno por analfabetoj estis multe plifaciligata ĝis preskaŭ nur la skribado de l' nomo.

*

Filadelfio *(Philadelphia)* estas la naskiĝurbo de la fama deklaro pri sendependeco (j. 1776), kiun ĉiu usona infano lernas parkere, sed tiu urbo ankaŭ enhavas malsatajn infanojn laŭ enketo de la tiea direktoro de edukado. Li trovis, ke 4609 infanoj ne manĝas lunĉon pro la severa senlaboreco en la urbo, k starigis kason por nutri la infanojn. Antaŭ du monatoj kapitalista loka ĵurnalo diris, ke 20 000 infanoj devas iri al la lernejo sen matenmanĝo. La teksa industrio moviĝas suden k la idoj de la laboristoj suferas en la ombroj de malriĉo eĉ en la lando de Huvera (*Hoover*-a) prospero.

Signifoplena artikolo aperis en la maja oficiala organo de la A. F. L. Ĝi permesas direktoron de la lernklasoj en publika edukado de Ĉikago fanfaroni pri la pliboniĝantaj vivkondiĉoj de la usona laboristo, kiu aĉetis akciojn ĉe "sia" kompanio. Kiun celon devas havi la usona edukadsistemo, kiu prizorgas 25 milionojn en la unuagrada lernejo, 4 milionojn en la duagrada lernejo k unu milionon en pli altaj institucioj? La Direktoro, Eston V. Tobz *(Tubbs)*, respondas, ke la ĉina instruisto favoras la imiton de la prauloj; la angla lernejo instruas la idealon de servo (?); sed la usona lernejo instruas "... ke merito k malfacila laboro formas magian formulon, kiu ofte transŝanĝas la plej malkuraĝigajn cirkonstancojn en plej brilan atingon".

* * *

La K. P.-Parti-Lernejo en Novjorko raportis, ke ĝia studentaro kreskas al 1500 kompare je 60 studantoj registritaj en j. 1924. Prepar-lernejoj ankaŭ funkcias en la urboj Ĉikago, Detrojt *(Detroit)*, Klivlnd *(Cleveland)*, Filadelfio k Boston. Por plibonigi la aferon k starigi korespond-kursojn, la Partio alvokas por donaco de $ 10 000.

[1] Tiu punkto celas la 2 K-dojn, kies informojn ni publikigis en la n-o 304-a de "S-ulo". — *Red.*

"SLOT" EN BERLINO

MOR (14624)

De 23-a ĝis 27-a de julio 1930 okazis en Berlino (Germanio), antaŭe projektita en Hale *(Halle)* (Mezgermanio), la dua mondrenkontiĝo de laboristaj k kamparanaj infanoj, de junpioniroj ("Slot"), aranĝita de Gek-doj el la komunista partio. Partoprenis miloj da germanaj gepioniroj, centoj da eŭropaj ekstergermanaj gejunuloj k kelkaj aziaj junk-doj. Sovetaj k ankaŭ multaj alilandaj infanoj ne ricevis laŭdire la pasporton aŭ la enirpermeson germanan.

Dum la tagoj antaŭ la renkontiĝo, gelaboristoj en germanaj urboj salutegis la delegitojn eksterlandajn; merkrede, Berlinaj gelaboristoj bonvenigis en 7 grandaj kunvenoj la junajn gastojn. Ĵaŭde komenciĝis la kongreso per solena malfermkunsido. Standardoj, flagoj, "Estu pretaj"-vokoj, muziko, aplaŭdego, fotado, paroladoj pli malpli kompreneblaj de infanoj, la tuta kunvenego teatra prezentaĵo, sed bone montranta al junpioniroj la kunstaradon de l' ruĝa junulmovado. Certe, travivaĵo por la ĉeestintoj. Posttagmeze komenciĝis la laborkunsidoj, plenaj je raportoj, rakontoj de infanoj pri ilia penplena vivo k kontraŭstaro aŭtoritaton ŝtatan; infanaj raportoj. Baldaŭ necesis specialigi la laboron, starigi fakkonferencojn.

La kontraŭfaŝista rondo priparolis la danĝeron de faŝismo, naciismo por la proleta infanaro, la necesan kontraŭagadon, kies grava punkto i. a. estas la plifortigo de l' internacia eduko. Ankaŭ la lerneja fakrondo substrekis i. a. neceson de tutmondaj interrilatoj. Speciala konferenco por internacia eduko deklaris, ke estas tasko de proleta infanmovado, eduki novajn homojn kun novaj ecoj k kutimoj. Antaŭ ĉio, eduku internaciistojn, kies plej alta celo estu la internaciismo revolucia proleta, kiuj rompu la barojn de kapitalismo k naciismo. Rimedoj estu vojaĝoj k vizitoj reciprokaj trans la limoj, konkuroj sur kampo de internacia laboro, internacia korespondado, rilatiĝo kun junk-doj de landoj subpremataj, kontraŭbatalo nacian disecon, ankaŭ en Sovetio, ankaŭ ĉe plenaĝuloj, finfine ne forgesu la rimarkigon pri spertoj en la gazetaro infana.

La konferencoj pludaŭris vendrede k sabate. Sed ne nur teorie priparolante, la junpioniroj pasigis la renkontotempon. Komuna sporto, ludado, vizitoj k observoj en la urbego, teatro, manifestaciaj marŝoj k veturoj tra Berlino ilin okupis. Rimarkinda laborkunveno ankoraŭ estis la konferenco de helpantoj k gvidantoj de infantaĉmentoj komunistaj k komunistemaj.

La finkunvenego de pli ol dudekmil Gek-doj montris la entuziasmon de la junpioniroj k estroj. Sente, oni devis enesti en la granda komunaro de junuloj ruĝaj, kunhelpi, por ke ili atingu la celon socialisman.

Kvankam granda sukceso, bonege montrinte al infanoj, ke la mondo k la ruĝpionira movado estas pli grandaj ol la hejmlando k la naciaj pioniraj taĉmentoj, tamen restas multego por fari. Krom organizaj mankoj estas evitendaj la kutimoj naciaj, kiuj kontraŭstaras la sencon de internaciismo proleta. Mankis la komuna lingvo (la plejparto komprenis k parolis nur la germanan); el tio rezultis, ke multaj negermanaj Gek-doj ne povis kunlabori, malgraŭ la tradukoj. Ankaŭ rimarkataj estis malbonaj ŝercoj, kiuj baziĝis sur naciismo k neinterkompreno. Same: naciismaj doktrinoj ne tute forestis. La poresperantan laboron faris la Berlina grupo de LEA per disdonado de 3000 flugfolioj plurlingvaj. La interparoloj okaze de l' disdono montris, ke la junpioniroj nur malmulte scias pri esperanto, sed kelkfoje estas pretaj lerni. La estro de l' renkontiĝo k de l' junpionira movado estas preta akcepti la helpon de lab. esperantistoj. Kelkajn esperantistojn mi ĝoje povis renkonti.

KUN TIU ĈI NUMERO ESTAS EKSPEDATA "LA LERNANTO"

AKTIVA HELPO ESTAS NECESA!

PENSOJ DE MALLIBERULO

(Fino. Vidu antaŭan n-on.)

Malgraŭ mia nuna situacio — penplene mi devas reteni mokridegon; estas malagrabla aĵo ofendi estron. Kvankam li laŭ paragrafe ne rajtas ĉikani malliberigiton, li tamen aplikus iun intrigon por venĝi sian honoron. Ekzemple kaŝe li povas fari fi-ateston — tiel nuligante la lastan esperon pri eventuala pli frua hejmeniro. Inter la gardistaro nur malmultaj rajtas nomi sin "edukitaj homoj". Vivante en etburĝa medio ili havas nur malvastan horizonton; eble kelkaj el la pli junaj oficistoj tre volonte konsentus kun la nova epoko, sed, por konfesi malkaŝe, sincere sian opinion, al ili mankas kuraĝo. Dum mia libera tempo, mi studas nian karan lingvon. Alvenante mian ĉelon, ofte iu oficisto demandas scivoleme: "Kion vi faras?" Kaj al mia respondo: "Mi studas esperanton", li plej ofte faras miregan grimacon. Kelkaj tute ne scias ion pri esperanto, aliaj ne volas doni al nia lingvo la plej etan vivrajton. Ĉi-loke mi petas al la alilandanoj sendi pruvilojn, por ke mi povu refuti la fiasertojn de la dubantaro. La gardistaro kutimas agi nur laŭ ordonoj, tial ili atendas, ĝis la registaro ordonos: Lernu esperanton — estas plej urĝa tempo — la kontraŭuloj jam plenkreskis.

La seksa demando

Iam, antaŭ kelka tempo, diris dio: Estas ne bone lasi la viron tutsola — mi donos al li — kunulinon. Dirite — farite. Eble la tiama dio estis pli kunsentema — li bonsciis la funkcion de la homa aparato; aldoninte al la vira Adamo inan Evon, li plejgrade plibonigis sian majstran verkon. Sed iom post iom la granda majstro maljuniĝis — laŭdire — li anstataŭigis sian personon per la t. n. "nigra — veŝtitoj". Lastaj tre baldaŭ forgesis la tiom gravajn ordonojn de sia estro, i. a. la absolutan neceson de l' kunvivado de viraj k inaj kreaĵoj. Ili mem plenumis, plenumadas sian devon, serĉas forgesi eventualajn malgajajn momentojn ĉirkaŭbrakante iun belulinon. Por ili la tablo ĉiam estas preta.

La plej multaj homoj hontas priparoli la seksan temon, kvankam ĉiu normalulo celas kunvivadon kun la ali-seksa homo, laŭ neforigebla naturleĝo.

Sed nun, karaj gefratoj! Miloj da niaj homfratoj laŭleĝe devas pasigi jarojn, eĉ en multaj kazoj sian tutan vivon en karcero. Por ili ne ekzistas eblo kontentigi siajn naturajn sentojn. Estas konstatita afero, ke pro ĉi tiu malpermeso, iom post iom estiĝas korpaj k spiritaj difektoj. Neniu povas postuli daŭre reteni aŭ eble elŝviti tra la haŭto tiujn sentojn. Male, kuracisto ĉiam rekomendas atenti regulajn seksrilatojn. Ĉu la malliberuloj eble havas apartajn naturojn rilate al la seksodemando? Proprakorpe mi suferadas terurajn turmentojn — antaŭ la okuloj pluaj 5 jaroj pasigotaj en ĉi tiu fidomo — ho, griza, timiga estonto!

Tro malmulte el la ceteraj homfratoj okupas sin pri la ĉi tie tuŝita temo. Estu ĉies nepra devo konsideri la sorton de l' homfrato. Ni celadas pli bonan tempon; tial mi elkore petas vin doni amon anstataŭ malamo k malestimo. La jaroj pasos. Kiel iam ni batalos denove ŝultro ĉe ŝultro. Neniam mi forgesos ĉi tiujn jarojn "malantaŭ muroj" . . .

H. H., Germanio.

Belega romano! JACK LONDON

LA FERA KALKANUMO

Tradukita el la angla de G. Saville.
368 paĝoj. Formato 12×18 cm.
Prezo 2,60 mk. g., (bindita 3,50 mk. g.)

★ Mendu tuj ĉe Administracio de SAT, Colmstrasse 1, Leipzig O 27, aŭ Sidejo de SAT, 23, rue Boyer, Paris XX

LA KLASBATALO TRA LA MONDO

El Japanio

Granda manovro subpremas la proleton

Dum 1. julio estis en urbo Kuraŝiki arestataj du laboristoj pro disdonado de l' semajna kompartia gazeto *Dai II Musanŝa Simbun.* Poste oni traserĉis la loĝejon de unu arestito, K-do Sigei, k trovis 30 ekzemplerojn de l' gazeto. La arestitoj nenion konfesis antaŭ spionoj. Tial ondo de blanka teroro atakis la urbon Okajama: spionoj arestis 8 konsciajn laboristojn, el ili la solan proletan urbparlamentanon, K-don Nakahara. Arestoj okazis de 3.—7. julio; preskaŭ ĉiuj reliberiĝis, krom K-doj Daitoo, Ogoo k Tanaka, kiu lasta algluis kontraŭmilitajn flugfoliojn en militŝipo. Tuj post la aresto kelkaj individuaj laboristoj k intelektuloj, kolektis monon parte transdonitan al la Ruĝa Helpo k sendis manĝaĵon. — Tiu ĉi subpremado havas gravan signifon, ĉar en venonta aŭtuno venos la imperiestro al Okajama por kontroli la manovron. Por tiu vizito oni mobilizas ĝendarmojn, soldatojn, policanojn k spionojn. Pro tio oni subpremas senmotive revoluciulojn, kiuj batalas kontraŭ peza imposto okaze de granda manovro, kiu estas preparado por dua mondmilito.

Iris Monteto (13 868), Okajama.

Eduklaborista sindikato en Japanio

Pro malpliigo de l' lokaj komunumaj buĝetoj laŭ la ŝparpolitiko de l' registaro la salajro de popollernejaj instruistoj estis akre malplialtigata, k lastan marton 15 mil instruistoj estis senlaborigitaj. Krom tio, mizeriĝo de l' vivstato pro salajro-nepago, ĉesigo de salajro-plialtigo ktp. elvokis inter la instruistoj blinde obeantaj ĝis nun al ajna ordono de la regantoj, deziron por amasa movado. Tiel fine formiĝis organiza komitato de Tutjapana Eduklaborista Sindikato.

Studenta striko en Japanio

En majo okazis ĉe Nippon-Universitato giganta student-striko, kiun iniciatis nur eta parto da studentoj, sed fine partoprenis la tuta studentaro de 26. majo ĝis 17. junio. La 26. majo 800 studentoj el la noktokolegia fako havis kunsidon kun postuloj: oficialigo de la studenta klubo, malaltigo je 30% de la lerneja depago, libero pri parolo, asociiĝo k studo k. a., kiujn la lernejo rifuzis, k la tuta kunsido fine decidis la strikon. La 27. — mil studentoj de l' kolegio ankaŭ decidis striki. Tiel la striko evoluis ĝis la 29. al ĝenerala striko. La 9. junio okazis granda strata manifestacio (4 arestitoj). La striko finiĝis provizore per submetiĝo de la lernejo la 17. junio.

Laŭ "Scienco Proleta" (n-o 8), Tokio.

El Aŭstralio

En Aŭstralio laŭ elcentoj nun estas plej multaj senlaboruloj el inter ĉiuj industriaj landoj. Mi mem nur hazarde laboris 4 semajnojn depost decembro. El loĝantaro de 203 mil personoj en Okcidenta Aŭstralio ricevas nutraĵon 10 mil familioj; 800 senhavaj fraŭloj ricevas tage 2 sespencajn manĝojn k 1 lito-bileton. 400 senlaboruloj estas sendataj eksterurben al milita kazerno, kie ili laboras dum 1½ tagoj semajne por havigi al si manĝon k loĝadon. 3800 edzaj senlaboruloj ricevas 1 ŝilingon tage (po familiano). Tio nur estas oficialaj nombroj (la veraj estas pli grandaj). Senhavaj fraŭlinoj ĝis nun ne ricevis, sed baldaŭ ricevos registaran helpon. Oni ne plu bezonas venigi el kamparo nigrajn indiĝeninojn. Blankaj virinoj estas malkaraj. Bordeloj trovas tre penigan konkuradon. La proletaro perdis fidon al la registaro, kiu estas tute senpova. Kapitalistaj bankoj regas, dum la registaro estas kiel argilo en iliaj manoj.

E. M. Wallace (14 442), Perth.

Simon Radovicki al la Argentinaj laboristoj

Post sia liberiĝo K-do Radovicki direktis leteron al la argentina proletaro, en kiu li salutas anarkistojn k laboristojn el Argentino k per kiu li memorigas pri la teruraj 20 jaroj, dum kiuj li estis malliberigita en malliberejo de Fajrolando kiel anarkisto; li akcentas, ke lia liberigo ne signifas la liberigon de l' tuta popolo, ĉiam sklava sub la burĝa tiraneco. Li salutas ankaŭ nome de l' ankoraŭ en mallibero restantaj K-doj k alvokas batali kontraŭ la karcerojn k por ilia liberigo.

Laŭ I. N. O.

Materialon por la kuranta Fak-Paĝo ni ne ricevis ĝis redaktofino por tiu ĉi n-o.

Ankoraŭ pri "Letero el Italio"

La itala K-do verkinta artikolon sub supra titolo en n-o 303, refutas al K-do Martz (vd. ties konsiderojn en n-o 307), ke lia "letero" krom la efektiva eraro pri la cito de l' valuto ne entenas iujn malverojn, k ke la aserto pri 50% da malveroj tute ne estas ĝusta. Ĉiu, kiu konas la vivkondiĉojn, industrian k ekonomian situacion en Italio, povas atesti tion. Estas kompreneble, ke la faŝistoj neniam pravigos tion; sed ĉu oni do pli fidu al la faŝistaj asertoj, ol al tiuj de niaj K-doj?

Alvoko de l' Internacia Transportlaborista Federacio

En Italio tramvojistoj k fervojistoj rekonstruas, kvankam kontraŭleĝe, siajn sindikatojn. Samaj klopodoj estas farataj en aliaj trafikbranĉoj. Niaj bravaj K-doj en Italio, kiuj, ignorante la grandajn danĝerojn, plue plenumas sian proletan devon, turnis sin al la lab. movado de l' tuta mondo, por batali per plena energio kontraŭ la faŝismo. Subtenate de I. T. F., dume ili daŭrigas sian batalon per ĉiuj disponeblaj rimedoj. Kiel vi povis legi en la ĵurnaloj, aeroplano superflugis la urbon Milano k disĵetis kontraŭfaŝistajn flugfoliojn. Tuta nia klopodo celu helpi al niaj italaj K-doj havigi al si novajn batalrimedojn. Tial ĉiu K-do konsideru kiel sian honordevon kunhelpi rebonigi la grandegajn materiajn domaĝojn, kiujn devas suferi niaj italaj amikoj. Ni konsiliĝis kun ili k petas per tiu ĉi alvoko nun, ke ĉiu donu moneron k instigu aliajn fari la samon. Antaŭen kontraŭ faŝismo, subpremo al libero k la militdanĝero! Praktiku solidarecon!

La komitato de I. T. F.[1]

[1] Kolektitajn sumojn oni sendu al sekretariejo de ITF, Vondelstr. 61, *Amsterdam (W)*, Holando.

Ĉeeste kun grandaj spiritoj

Mi admiras homojn, kiuj firme elsuferas malfeliĉon; sed multe pli mi admiras tiujn, kiuj firme eltenas antaŭ sukceso . . . ili estas herooj.

Oktavo Mirbo.

Ne la amo al la homaro, sed la senpoveco de ilia amo malhelpas la kristanojn, ke ili ne punbruligu nin. *Niĉe.*

Por malkovri la fizikajn leĝojn, oni tenas sin for de konversacioj k diskutoj; oni fermas sin en laboratorio; ĉe la profundo de soleca esplorado oni forgesas pri la homoj, pri iliaj antaŭjuĝoj, pri la logoj de ilia infanece avida lerto. Kiom multe pli da silento k trankvilo necesas por penetri ĝis la misteroj de l' saĝo. *Han Riner.*

La vivcelo de la homo estas fariĝi sendependa, libera k sincera. *H. Ibsen.*

LA NOVA EPOKO

la literatura k scienca monata revuo de SAT aperigis en aŭgusto:

P. Romanov, Floroj de Siringo (el la rusa). — *Hrima,* En fremda land'. Orig. poemo. — *Bartelmes,* Eksterordinara prezentado. Orig. — *D-ro Maranon,* La seksa eduko k la seksa diferenciĝo (dua parto de tiu interesa, popular-scienca studo).

Ĉiu K-do subtenu per abono nian unikan literaturan gazeton! Unuopa n-o: 0,35 mk. g.

Administracio de SAT, Colmstr. 1, Leipzig O 27.

YAFFLE diras

LA LUMO DE AZIO

Iu petis, ke mi diru kelkiom pri Hindio. Mi bedaŭras, sed mi devas rifuzi; la temo tro multe naŭzas min.

Mi jam estas satega je la Naciista demando. Lastatempe mi staris apud la lito de naŭ eksiĝintaj koloneloj, kiuj rompis al si sangvejnojn nur pro ĝia mencio, kaj mi esperas, ke mi estas sufiĉe humana por esti decidinta konservi dignan silenton rilate al la temo Hindio — silenton, kiu, laŭ mia opinio, devus esti interrompata nur de maŝinfusila pafado k la voĉoj de juĝistoj disdonantaj kondamnojn.

Ĉi tiuj hindoj ne meritas atenton. Ilia maldankemo estas proverba. Ni igas ilin parto de la plej granda Imperio, kiun la mondo iam vidis — kvankam mi konfesas, ke mem mi ne vidis ĝin. Ni honorigas ilin permesante al ili funkciigi por ni niajn kotonfabrikojn, kiam la absurdaj postuloj de la Lankaŝiraj homoj por nova ĉemizo por ĉiu jare igas laborkostojn maleblaj; ni permesas al iliaj princoj venki ĉe nia Darbi (plej fama vetkuro ĉevala. Trad.). Kaj per kio ili rekompencas al ni? Per impertinento.


Ni ŝarĝas ilin per bonaĵoj sufiĉe riĉaj por naŭzi ilin, kio ja ĝenerale rezultas. Ni elverŝadas monon pro ili. La nuna Registaro elspezis £ 750 000 nur pro la persekutado al 31 laboristaj gvidantoj. Kaj ili ricevis tiun sumon farinte praktike nenion, la mallaboremaj hundaĉoj. Ni laborigas 80 000 hindajn virinojn en niaj minejoj kontraŭ ses pencoj tage — pli ol mi havis kiel poŝmonon, kiam mi ankoraŭ vizitis lernejon.

Kaj spite ĉio ĉi ili estiĝas pli k pli malvirtaj. Ili eĉ portas malpli da vestaĵoj ol antaŭe. Mi konstatas, ke la pokapa konsumo de kotono por iliaj vestaĵoj estas 14 metroj hodiaŭ kompare kun 16 metroj antaŭmilite. Iuj asertas, ke ĉi tio estas pro ilia pli granda malriĉo; tio ne povas esti, ĉar nia komerco kun Hindio estas grandega. Estas pro ilia maldeco; aŭ ili portadas malpli aŭ ne sendas siajn vestaĵojn tiom ofte al la lesivejo. Kaj pro la sama kialo ili permesas al siaj infanoj nude ĉirkaŭkuri ĝis pli malfrua aĝo ol antaŭe.

Estas faritaj subinspiroj, ke ni perdas Hindion. Ĉu estas permesata al mi rememorigi al britiaj laboristoj la lastatempan averton de Lordo Rotermir (*Rothermere*) al la laborista klaso — ke, se ni perdus Hindion, ne estus sufiĉe da mono por pagi al ili la senlaborulan almozaĵon? Laboristoj devus elkompreni ĉi tion. Multaj el ili emas grumbli pro la kutimo ĉe kotonk jut-fabrikistoj translokigi siajn entreprenojn al Hindio, kie ili povas havigi al si laborforton je frakcio de kutima prezo, tial ĵetante anglojn en senlaborecon.

Estas strange, ke la laboristoj ne povas kompreni, ke ĉi tiu estas verdire bonfara sistemo, evoluigita en la interesoj de la laboristoj. Permesu al mi klarigi tion. Kotonfabrikoj ne povas liveri profiton en Anglio pro la altaj salajroj. Kaj se entreprenistoj ne faris profitojn, estus neniom da riĉuloj k neniu impostebla, k la Registaro ne havus monon. Sekve se ni perdus Hindion, la Registaro ne povus imposti pri la £ 150 000 000, kiujn anglaj entreprenistoj k akciposedantoj gajnas el hindia laborforto, k ne estus sufiĉe por pagi ŝtatan almozaĵon en Anglio.

Nu, estas tre malmulte da diferenco inter ŝtata almozaĵo k salajro. Tial, anstataŭ ol grumbli, ĉar la hindoj havas siajn labortaskojn, la anglaj laboristoj devus prefere mediti, kiel estas agrable lasi al la hindoj fari la laboron, dum ili mem ricevas la monon. Ili devus prefere sin rigardi kiel anglajn sinjorojn posedantaj multajn negrojn, kiuj laboru por ili. Ĉi tio, se mi ĝuste interpretas ĝin, estas la ideo de Lordo Rotermir; k mi opinias, ke se Laborpartiaj pledantoj, anstataŭ inciti malkontenton kontraŭ imperialismon, prezentus ĉi tiun vidpunkton al la laboristaro, tio multe helpus al la kreo de feliĉa unuecsento inter ĉiuj klasoj en ĉi tiu lando.



Ni ŝarĝas ĉi tiujn hindojn per riĉoj



kaj donas al ili la avantaĝojn de la civilizo



tamen, ili neniam donas al ni dankan vorton

Ne kredu, ke mi absolute kontraŭas konsenti al Hindio memregadon. Ĉi-rilate ne malutilos, se mi konfidos al vi sekreton. La fakto estas, ke efektive ni donos tion al ili. Mi interparoladis hieraŭ kun s-ro Ebenezro Q. Mak Salomono Ŝnic (*Schnitz*), Prezidanto de la Tut-Brita Banko. Li rimarkigis, ke la unusola maniero por ĝuste regadi popolon estas kredigi al ĝi, ke ĝi sin regadas. Li klarigis al mi kiel, depost kiam la brita laborista klaso elektis sian propran registaron, li k liaj kunbankistoj atingis absolutan kontrolon super la mondsituacio k nun direktas la tutan vojiron de la industrio. Li diris, ke li tute ne atendis, ke la Brita Registaro tiom facile akceptus raciigon, sed aldonis kun ennaskita kosmopolita sagaco, "Nenio faras la homojn tiom submetiĝemaj al direktado, kiel la kredo, ke ili mem regadas".

Li favoras konsenti al Hindio sian propran Parlamenton, ĉar, li diris, ke nenio estas tiom utila al bankisto, kiom la ideo, ke Parlamento regadas. Mi ne komprenis tion; li ridis, kiam li ĝin eldiris, k mi ankaŭ same, ĉar li ĵus donacis al mi cigaron. Eble ĝi estis ŝerco, k neniam mi povas kompreni la signifon de internaciaj ŝercoj. Sed li daŭrigis por aldoni, ke la homoj ĉiam grumbladas, ĝis ili havas parlamenton, tial, se vi deziras igi ilin silentaj, vi donas al ili parlamenton unue, k tiam vi povas senbrue daŭrigi la vojon. Sed, kompreneble, ĝi devas esti efektive indiĝena — ĉiu membro devas alporti sian naskiĝ-atestilon, k ceteron. Li diras, ke ju pli indiĝena k demokrata estas parlamento de iu nacio, des malpli la popolo atentas pri tiuj, kiuj starigas ĝian financsistemon.

Do, estas kredeble, ke pro la interesoj de ĝusta mondregado eble estos necese doni al Hindio sian propran parlamenton por malebligi al la hindoj, ke ili sin regadu. Sed mi ŝatus peti vin, ke vi eldiru nenion pri tio nunmomente, ĉar la detaloj ankoraŭ ne estas aranĝitaj. Tial dume vi povas daŭre ripetadi, ke memregado por

TRA ESPERANTIO

INTER NI

— Ĉu *jes* aŭ *ne* SAT estas politika organizo? Mi petas, ke vi respondu nur per unu sola vorto.

Tiel aldemandis min ĉe kunveno de SAT-anoj en iu skotlanda urbo kvindekjara nova esperantisto, eklerninta la lingvon nur antaŭ ses monatoj...

—... Ne, mi respondis.

— Nu, kial do SAT-anoj kutimas kanti la *Internacion* en siaj grupkunvenoj? Tiu kanto ja havas politikan signifon.

La vizaĝo de mia demandinto ekbrilis per iom ruza rideto, ĉe la konstato, ke lia demando min embarasas. Serĉante respondon al tiu neantaŭvidita demando, mi ekmemoris la diron de iu eminenta neŭtrala esperantisto, hazarde renkontita en Londono. Li rakontis, ke en Oksfordo iu kongresanino forte protestis kontraŭ tio, ke estis ludata la angla nacia himno: *God save the king* (Dio savu la reĝon). Tia kantado ja rompas la neŭtralecon, ĉar estas evidente, ke laŭdado al reĝa regsistemo devas logike ofendi respublikanojn.

Vane nia neŭtralulo provis konvinki la protestantinon per la klarigo, ke kiam Kongreso okazos en Francio, oni tie ludos la *Marsejezon,* en kiu estas rekomendata mortigi reĝojn — k kiam, en Moskvo... la Internacion.

Estas evidente, ke la ĝisosta neŭtralulino formale pravis en sia protesto. Kaj same ankaŭ nia nova SAT-ano en sia embarasa por mi demando.

Kiu iomete konas la historion de la esperanto-movado, tiu cetere scias, ke eĉ la "interna ideo" de Zamenhof estis konsiderata kiel havanta politikan signifon k estis forte atakata siatempe de s-ro De Bofron *(Beaufront),* la ulo, kiu perfide "defendis" esperanton ĉe la fama *Delegitaro por alpreno de internacia lingvo* k kiu poste fariĝis unu el la gvidantoj de la ido-movado.

Logika neŭtralulo sekve devus eĉ protesti, kiam estas kantata *La Espero* en neŭtralaj rondoj...

Kion ni konkludu el tiaj konstatoj?... Peŭh! tion, ke la vortoj, eĉ en nia logika lingvo, vole nevole havas tamen iom malprecizan sencon, aŭ eĉ kelkajn sencojn. Ĝenerale vorto akiras sian ĝustan signifon nur en iu frazo k la frazo mem ne povas esti ĝuste komprenata ekster ĝia kunteksto.

Eĉ plej bona vortaro ne ĉiam difinas tute precize la sencon de multaj vortoj. En nia *Plena Vortaro* oni tamen povas trovi, se ne tute precizan, almenaŭ kontentigan difinon pri la vorto *politiko*: "1. Scienco aŭ arto rilata al regado de ŝtato. 2. Ĝenerala agmetodo." Laŭ la unua senco estas evidente, ke SAT ne estas politika organizo; sed laŭ la dua senco ĝi ja havas ian politikon. Celante helpi al la emancipo de l' Proletaro, ĝi ja ne povas ne havi proletan, kontraŭburĝan politikon. Kaj tial ke la *Internacio* estas la himno plej ofte kantata de la organizitaj proletoj, logike k nature tiu himno sin trudas al la SAT-anoj.

Se tiu ĉi malfrua nepetita klarigo trafos en la manojn de la koncerna K-do, li eble konvinkiĝos, ke SAT, kvankam estante iusence "politika" organizo, estas tamen *nepolitika,* ĉar ĝi ja ne celas regi ŝtatojn, nek aprobi aŭ malaprobi la agadon de laboristaj partioj aŭ ŝtatoj.

E. L.

Hindio disfrakasos la Imperion k. s.

Kiam venos la tempo por kriadi la kontraŭon, la banko, kiel kutime, provizos la gazetaron k parlamentanojn per la ĝustaj frazoj.

Tradukis 2978, el "New Leader", 20. 6. 30, Londono.
Ilustraĵoj de "Yaffle" el la sama gazeto.

POR EVITI LA RIFON

4. LISTO:

13 156 (Bournville) 3/— ŝil.
13 160 (Bournville) 5/— ŝil.
7 584 (Litovio) 6,25 mk. g.
1 795 (Vieno) 3 ŝil. aŭstr.
Johansson (Stockholm) 5 kr. sved.
de Bruin (Enschede) 20 mk. g.
Benjamin (Amsterdam) 20 mk. g.
Grupo de Aulnay s/Bois 55 fr. fr.
Rolo (90) 20 mk. g.
10 742 (Dortmund) 1 mk. g.

KOMUNIKO DE LA DIREKCIO DE SAT

Oni daŭrigas bombardi la Redaktejon de "S-ulo" per materialo rilata al nia monafero en Moskvo. Tiuj artikoloj pli malpli havas polemikan karakteron k liveras nenian praktikan solvon. Ni sekve decidis ne enmeti tian materialon.

Al la K-doj, kiuj riproĉas nin pro tio, ke ni konsentis tiom grandan krediton al SEU, ni simple rediru, ke ni konservas la esperon, ke la ŝuldata mono finfine trafos en nian kason. Jam depost komenco de majo ni ne plu akceptis iujn mendojn el Sovetio. Ni plie ree informas, ke nun troviĝas en Moskvo (aŭ Odeso) por presado:

1. *Kosmopolita Ideo (proks. 250 pĝ.), jam de marto 1929 en Moskvo!*
2. *Ford aŭ Marks (Walcher), proks. samampleksa.*
3. *Rakontoj pri Kamparo (el ukraina liter.).*
4. *Kiel homo formis sian dion (Simmel).*
5. *Skizo pri ekonomia geografio (Ĥorrabin), ĉ. 200-paĝa.*
6. *Pri naskevito (Fiŝer), amplekso: volumo de "Bibl. de Sennaciulo"*[1].

Plie ni, interkonsente kun la Administracio, informas la mendintojn de la "Plena Vortaro" en Sovetio pri nia decido, ke ili repostulu sian monon al CK SEU, Moskvo. Ni eĉ konsentas pagi por la pruntita sumo renton de 7%. Tio, aldone al la sumoj kolektitaj por la traktoro, iom malgrandigos la ŝuldon.

Ni cetere gardas la esperon, ke finfine niaj monaj rilatoj kun Sovetio normaliĝos. La Sovetia SAT-anaro pli malpli frue sukcesos konvinki la koncernan Instancon en Moskvo, ke la varoj liverataj de SAT estas same necesaj kiel maŝinoj aĉetataj ĉe kapitalistaj firmoj por konstrui socialismon.

*

Nun ni esploras pri eblo aperigi broŝure la Protokolaron de la 10-a Kongreso; kaj ni esperas sukceson tiurilate.

NI ORGANIZU LA HELPON AL NIAJ SOVETIAJ GEK-DOJ !

La fakto, ke el preskaŭ 2000 (1987 laŭ Jarl. 1929/30) sovetiaj SAT-anoj nur kelkaj ricevas "S-ulo"n, instigas min, alvoki vin por helpi. La bedaŭrinda stato de la monafero devigis nian administranton malakcepti abonojn al "S-ulo" k "LNE" el USSR, k nun nur ricevas tiuj la gazeton, kiuj jam pagis la abonon por la tuta jaro (nur malgranda parto). Fakto estas do, ke niaj aktivaj Gek-doj en USSR estas nun preskaŭ malhelpataj partopreni la SAT-movadon, ĉar mankas la parolilo "S-ulo", forestas materialo k informoj.

Jam aperis alvokoj en "S-ulo", ke ĉiu ekstersovetia K-do abonu la gazeton por sia sovetia korespondanto. Mi proponas pli organizite agi: *ĉiu SAT-rondo* (ekstersovetia) abonu por iu sovetia SAT-rondo "S-ulo"n. La administrejo dissendu al sovetiaj grupoj

[1] Intertempe ni estas informitaj, ke CK SEU en sia lasta kunsido (la komuniko datas de 17. 8. 30) decidis ekpresi en eldono de SAT tradukon el "Eŭgeno Onegin" de Puŝkin.

informajn cirkulerojn, ke ili anoncu adreson, kien estu sendota la gazeto. Tiuj adresoj estu presotaj en "S-ulo" k ĉiu konc. SAT-rondo pagos por 1 grupo sovetia, samtempe sciiganta al la administrejo, por kiu grupo.

Tiel ni devas atingi, ke ĉiu SAT-rondo en Sovetio ricevos almenaŭ 1 ekz. de "S-ulo". Tiel ni devas restarigi la kontakton endanĝerigitan, kun niaj klask-doj en la lando de l' proleta diktaturo. *Ni ekagu!*

W. Stertzenbach (4567), Essen.

La LEA-grupo Essen abonas por la SAT-anoj en Irkutsk 1 ekz. de "S-ulo".

*

Leginte, ke mendoj de sovetianoj ne plu estas plenumeblaj, mi faras proponon, kiu, en okazo de ĝia efektivigo, eble solvos la financ-embarason, kiu trafis SAT.

Ĉiutage filioj de l' Ŝtata Banko en diversaj punktoj de Sovetio elpagas al multaj loĝantoj monsumojn senditajn el eksterlando de parencoj de sovetianoj (plejparte malgrandaj sumoj de 10 ĝis 100 rubloj al persono). Tiu mono estas ricevata *ne* por varo sendita el Sovetio, k ĉar tiuj sumoj ne estas antaŭkalkuleblaj de l' sovetia financaparato, estas do dubinde, ke ili estas enkalkulataj en la finanzplanoj *komence* de l' komerca jaro. Tiaokaze la nomita malkonstanta valutkvanto, venanta Sovetion el alilando, certe ne povas influi la antaŭe ellaboritan ŝtatbuĝeton por la *kuranta* jaro.

Mi opinias, ke se multaj aŭ almenaŭ iuj el la mon-ekspedontoj al parencoj en Sovetio sendus la koncernajn sumojn al Leipzig je konto de SAT, k CK SEU transpagus tiajn sumojn al adresatoj, tiam la problemo de financinterrilatoj inter SEU k SAT ricevus solvon. Praktike SAT povus anonci en kelkaj naciaj gazetoj, ke ĝi transprenas banktaskon liveri monon al sovetianoj sendatan de parencoj tien; — aŭ CK SEU instigus per anoncoj en oficiala sov. gazetaro sovetianojn ricevantaj monon el eksterlando, rekomendi al siaj parencoj pagi al konto de SAT. Sendepende de tiu projekto k ĝia efektivigeblo CK SEU povus cirkulere sin turni *al siaj anoj*, ke tiuj el ili, kiuj ricevas monon el eksterlando, praktiku la proponitan manieron; eĉ tiel estus atingebla jam ioma sukceso en malŝarĝo de la ŝuldo.

G. B. (Leningrad).

10-a Kongreso: Raporto de la bufedo

La kongresanoj tenis konkurse okupataj niajn K-dinojn ĉe la bufedo. K-dino Yelland, K-do Neu, K-dino Abramson k. a. montris taksindan persistemon. K-dino Holt estis heroo sur sia kasista posteno, kie ŝi deĵoris dum 6 tagoj de la 9-a matene ĝis post la 11-a nokte, donante kuponojn, prenante monon k parkerumante ĉiujn konstante ŝanĝiĝantajn manĝoprezojn. Ankaŭ ŝi devis scii, kie estas perditaĵoj, k fakte neniu duan fojon bezonis demandi, ĉar la perditaĵo estis trovita. — La proksimuma enspeza sumo estas £ 45; la neta profito (£ 13) estas transdonita al la kongreskomitata sekretario. Konsiderante, ke la oficistoj k 20 helpantoj ricevis dum 5 tagoj senpagan temanĝon ĉe la bufedo k nutraĵon dum la daŭro de l' Kongreso, krome dum du vesperoj post la Kongreso restintoj ricevis senpagan panon k limonadon, k la prezoj por manĝoj ĉe la bufedo estis malkaraj (prezo de butiko), la bufedo bone laboris k esprimas dankon al ĉiuj sindonaj K-doj, kiuj ĝoje plenumis sian 14-horan deĵoron k kontribuis al la sukceso, same kiel al la diligentaj manĝantoj. Ĉiuj ricevis sufiĉe, krom la stratknaboj, al kiuj oni disdonis ĉe la pordo kongresbananojn.

Bufedo.



Aĉetu akciojn

de la SAT-Kooperativo!

Se vi volas efike subteni vian organizon, vi aĉetas por via ŝparmono SAT-akciojn. Tiuj akcioj estas repageblaj post 3 jaroj, plus 10%-a jara rento. — Ekzistas 2 serioj (akcioj por 1 dolaro usona k por ½ dolaro).

Helpu fortigi la materian bazon de SAT!

Averto al grupsekretarioj k korespondantoj

Du tagojn, dum la 10-a Kongreso, alvenis perpoŝte leteroj ĉe mi kiel peranto. La sendintoj adresis ilin ne eĉ al la lasta peranto, sed al pli malnova peranto, kiu transsendis ilin al mi. Konstatante la letercelon, mi transdonis ilin al la kongres-sekretario. La leteroj ne estis legataj, sed nur menciataj, ĉar la Kongreso demandite ne deziris ilian legadon. Notu tion jenaj K-doj: H. Pas (10 450) — tuta grupo; 9498, Mannheim; Dunfermlina grupo (8132); 14 915 (Stockport); 3550 (Leipzig), Lodza grupo (Neugarten).

B. France (508), SAT-peranto, Britio.

EKSTERLANDAJ VOJAĜOJ

Sendube "Ruĝa vagulo" (en n-o 298) faris malkorektaĵon ne anoncinte sin ĉe la peranto en la sudfrancia urbo. Tamen ankaŭ mi devis konstati, ke solidaro k frateco en diversaj lokoj treege diferencas, k multloke necesas pliboniĝo. Respondante al la Liverpool-a K-do (n-o 305/6) mi nur rakontu mian aventuron en belgia granda urbo.

Antaŭ du monatoj mi ricevis trisemajnan libertempon. Mia plano estis, nur kelkajn tagojn veturi eksterlanden. 14 tagojn antaŭ la vojaĝo mi skribis al la peranto[1] de l' elektita urbo en Belgio. Mi petis pro respondo, ĉu li konsilas veni aŭ ne. Pasis 10 tagoj. Ne alvenis respondo. Mi pensis, ke li konsentas; tamen mi skribis ankoraŭfoje anoncante mian alvenon. Post 5 tagoj mi veturis. Alveninte mi tuj serĉis la peranton. La koro jam pli forte batis, kiam mi trovis ĉe lia pordo grandan afiŝon kun la verda stelo. Sonorinte, neniu malfermis. Trifoje mi revenis. De najbaroj mi sciiĝis post granda penado, ke li jam du tagojn ne estis hejme. Mi nun traveturis trame la tutan urbon de unu adreso al la alia ĝis la vespero sen renkonti eĉ unu K-don, de kiu mi nur povus ricevi konsilon. Mi ja havis sufiĉe da mono por ankaŭ pagi altajn hotelprezojn, sed ĉiu K-do scias bone, ke monon malfacile ŝparitan oni ne volonte tiel forĵetas. En antaŭurba parto mi malfrue renkontis K-don; sed eble ne sufiĉe konante la urbon, li ne bone povis konsili al mi pri tranoktejo.

Mi nur bedaŭras, ke la peranto tiom forgesis sian devon k ne almenaŭ fortenis min de la urbo, ĉe tiom malbonaj cirkonstancoj.

14 076 (Mainz).

ESPERANTO EN PRAKTIKO

La Estraro de l' Asocio de Socialistaj Juristoj en Pollando petas elkore la esperantistajn juristojn bonvoli respondi plej baldaŭ (antaŭ la 15. IX. 1930) al jenaj demandoj: 1. Ĉu ekzistas en via lando iaj limigoj por fariĝi advokato (limigoj oficialaj aŭ sub formo kaŝita). 2. Kiaj estas tiuj limigoj, de kia dato k kiaj kaŭzoj ilin enkondukis.

En okazo de respondo negativa je ĉi-supraj demandoj: 3. Ĉu ekzistas en via lando tendencoj por enkonduki la limigojn ĉi-suprajn, ĉu per konforma leĝo, ĉu per la vojo de faktoj. 4. Kia estas la sinteno de advokatoj-socialistoj k de socialistaj partioj de via lando koncerne la starigitan demandon.

Respondante rapide k detale, vi ne nur helpos al nia Asocio, sed ankaŭ al esperanta propagando inter polaj juristoj.

Asocio de Socialistaj Juristoj en Pollando.

Sekretario:
J. Litauer, Marszalkovska *81, Warszawa.*

---

[1] Ĉu la K-do aldonis respondkuponon? Se jes, li ja rajtas plendi, se ne . . . — *Red.*

Proverbaro Esperanta

laŭ la verko "Frazeologio rusa-pola-franca-germana" de *M. F. Zamenhof,* aranĝis *L. L. Zamenhof.*

Unu volumo in-8, 82-paĝa

Prezo: 1,50 mk. g.

Adm. de SAT.

RECENZEJO

Duope ricevitajn verkojn ni recenzas, unuope ricevitajn ni nur mencias.

Al Torento, de *Stellan Engholm.* Eld. *Heroldo de Esperanto,* Köln, Germanio. Formato 20×14 cm, 93 pĝ. Prezo: 1.50 mk. g.

Jen mallonga leginda romano, leginda pro la bona lingva stilo (krom kelkaj ne gravaj eraroj, ekz. "..., kial ne diri, (tion) kio(n) turmentas... vin?") k la iom poezia vualo, kiun ĵetas la aŭtoro sur la ordinarajn aferojn de l' popola vivo. Tamen, eble ĝuste pro tio, ŝajnas manko de realo ĉe la roluloj, krom la patro de l' centra figuro Karlo. Temas unue pri renkontiĝo de tiu lasta kun Enjo, en amuz-parko; li enamiĝas, sed ŝi deziras, ke ili estu nur amikoj, pro ia sekreta afero ŝia. Poste ŝi postulas, ke ili apartiĝu, sciigante, ke ŝi jam havis amanton, "kiu parolis pri epoko de liberaj homoj", ke ties infanon ŝi naskos, sed, ke li forlasis ŝin. Tiel ŝi agis por "esti libera". Do, foriro de Karlo; li militservas k laboras aliloke; poste revenas por la neevitebla rerenkontiĝo k edziĝo. Interplektiĝas en la rakonton, "radikaluloj", per kies konversacio oni povas suspekteti — nur tio, ĉar ili estas nur roluloj — ke la aŭtoro estas, se ne kontraŭ-socialista, almenaŭ kontraŭ definitiva aktuala ara agado por socialista celo; "Se vi renkontas ĉifonulon... al kiu ĉio mankas... donas al li iom da mono — tio estas frateco... Sed tio estas io tute alia ol la idolana (?) frateco." La heroino, post la am-sperto, ne interesiĝas plue pri socialistaj rondoj; Karlo iam kredis, ke li "komprenas la grandajn doktrinojn. Ne, mi ne komprenis... Mia mondo estas en mi mem, k ĝia estonteco estas infaneto, kiu... atendas la tagiĝon..." Do, fine ĉiu respondeco falas sur la ŝultretojn de l' Enjido: "Li (Karlo) rigardas la knabeton... La estonteco, ni devas bone flegi ĝin..." ktp. *E. K. L.*

Esploro pri la situacio de la bretona lingvo en 1928 *(Enklask diwarbenn stad ar brezoneg e 1928)* — unua libro de "Internacia Kelta Biblioteko" en bretona (kelta) kaj esperanta lingvoj, eldonita de revuo "Gwalarn", Poŝtkesto 75, Brest (Bretonujo!), Francio.

Ke esperanto estas nur ilo, kiu povas esti uzata por propagandi la ankaŭ plej sensencajn k malprogresemajn ideojn, pruvus tiu ĉi broŝuro en bretona k esp-a lingvoj. La sama eldonejo aperigas ankaŭ kvaronjaran bultenetón en esp-o por propagandi keltismon, bretonismon, t. e. provincismon k malnoviĝintan dialekton. Esp-o, leviĝanta lingvo de l' estonto, je la servo de malaperanta lingveto!, lingveto uzata de apenaŭ unu miliono da maljunaj malprogresaj kamparanoj!, lingveto zorge konservata de pastroj en predikato k kateĥizado. Dank' al sia aparta lingvo, Bretonio ĉiam estis k ankoraŭ estas bastiono de klerikalismo k kontraŭrevolucio.

La demando pri lingva aŭ nacia separatismo, naciaj minoritatoj aŭ nacia sendependiĝo interesas laboristaron nur se, okaze de tia naciisma movado, kapitalismo k imperialismo estas senmaskigataj k atakataj k nur se tia naciismo povas esti provizora kampo por progresigo de proletaj ideoj. En Maroko, Nikaragvo, Ĉinio, Hindio ... naciaj movadoj kontraŭbatalas imperialismon; singardeme proletaro atentu nur profiton de sia klaso k penu ankaŭ batali la naskiĝantan nacian kapitalismon. Minoritata lingvo k nacia movado povas jen favori jen malfavori provizore laboristaran emancipiĝon; sed estas revolucia vero, ke finfine post forigo de naciaj kapitalismoj k imperialismoj, iom post iom ankaŭ malaperos etaj k egaj naciismoj kun ĉiuj siaj apartaĵoj geografiaj, lingvaj, kulturaj... *M. B.*

Poŝtkarto kun landkarto pri Skandinavio. Eldona Societo Esperanto, *Stockholm.* Kolora. Prezo nemontrita.

Menciu nepre esperanton ĉe represigo de artikoloj esp.-devenaj!

MEMORNOTO

Represis el "S-ulo":

Hamburger Volksztg., 21. 5., Mezdun. alfavit (278), 18. I., Lernejlab. en tundroj (264), *Industrial Solidarity,* Chicago, 29. 7., Kulturtaskoj (Krjukov), *Die Rote Fahne,* Wien, 10. 8., Let. el Italio (303), *Freie Presse,* Strasburg, Liberpens. k esp-o (300), *L'Humanité,* Metz, 5. 8., Liberpens. k esp-o (300), 19. 8., Konsideroj de japana SAT-ano (301).

Priesper. artik. k notojn enhavis:

Signalen, Stockholm, 14. 8., 21. 8., *ITF-Bulteno,* Amsterd., jul./aŭg., *Dimanche Illustré,* Paris, 24. 8., *Freie Presse,* Strasburg, 23. 6., 7. 7., *La Voix libertaire,* Limoges, 9. 8., *Der Volkslehrer,* Langensalza, 17. 8., *Le Cinéphile,* Paris, 15. 8., *Daily Herald,* London, 23. 8.

Pri SAT enpresis:

Prolet. Zeitgeist, Germ., n-o 34, *Le Matérialiste,* Laeken-Bruselo, julio.

Pri SAT-Kongreso raportis:

Umsebenzi, Capetown, 1. 8., *La Vérité,* Paris, 22. 8., *The Bournemouth Times & Dir.,* 15. 8., *The Labour Standard,* Edinburgo, 16. 8., *The Nelson Gazette,* 19. 8., *Le Peuple,* Bruselo, 23. 8., *El Socialista,* Madrid, 20. 8., *Freie Presse,* Strasburg, 16. 8.

Peresper. materialon enpresis:

Le Réveil Ouvrier, Nancy, 20. 8., 23. 8., *L'Humanité,* Metz, 29. 7.

Esperanto ĉe la Amsterdama Instruista Internacio

Dum la Pariza kunveno de l' profesia sekretariaro (7./13. aŭg.) unu el la sekretarioj, K-do Lasnig (Aŭstrio) proponis, ke la landaj centroj estu komisiataj fari propagandon por esperanto inter siaj membroj, aranĝi kursojn ktp., tiel ke en la venontjara kongreso k ĉe la venontjara somera altlernejo interkompreniĝo povu okazi per esperanto. Tiu propono estas akceptita. (La somer-altlernejo okazos komence de aŭg. 1931 en Hamburgo.)

NIA POŜTO

15 700. — Principe ni akceptas vian manuskripton, sed ne scias ankoraŭ, ĉu la loko permesos al ni ĝin uzi.

Latvo. — Ni konsentas kun vi, ke "S-ulo" devus esti 16-paĝa; sed tio dependas de la nombro da abonantoj. Sekve... *Red.*

1311. — En la "Komuniko de la Direkcio" vi trovu respondon al via demando pri la sorto de via artikolo. Plie, vi povos legi en la Protokolaro pri la X-a Kongreso, kial povis aperi tiaj artikoloj, kiaj neniam antaŭe estus akceptita. Cetere la enmeto de via artikolo, tutcerte venigus aliajn el la speco de tiuj, kiuj tiom indignigas vin. — E. L.

16 689. — Ni uzos vian materialon iom post iom en "LNE"; pri la sorto de la de vi aludita proza manuskripto, transsendita al M., ni nenion momente povas sciigi al vi.

NEKROLOGOJ

La 24. julio 1930 mortis nia fervora

K-do Alfonso Champion (7545)

Li estis vundita per aŭtomobilo surstrate; sekvanta pulmmalsano estingis lian vivon, post 20-taga sufero.

Cordoba (Argentino).

Honoron al nia fervora membro!

Al korespondantoj k geamikoj ni sciigas, ke nia

K-DINO LISA JOHANSSON

SAT-membro 15 397, estas trafita de la morto je 4. aŭg. 1930.

Klubo Esperantista de ABF, Göteborg.

ENHAVO

	pago
Kiel CK SEU klopodas por ke SAT "evitu la rifon"	531—32
Notoj el Usono	532
"Slot" en Berlino	533
Aktiva helpo estas necesa!	533
La klasbatalo tra la mondo	534
Ankoraŭ pri "Letero el Italio"	534
Alvoko de l' Internacia Transportlaborista Federacio	534
Ĉeeste kun grandaj spiritoj	534
La lumo de Azio	535
Tra Esperantio	536—38

Presejo: Peuvag, Druckerei-Filiale Leipzig (Germanio)